

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :
Box 731F, Elizabeth-str. P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencej

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 107 (Ninth Year) Melburno (Melbourne), Australio.

10 Majo 1929

N.Z.E.A.

Progressing Satisfactorily.

Since the formation of the New Zealand Esperanto Association by Esperantists assembled in congress at Wellington on the 26th January last — of which a detailed report was published in our March issue (No. 105) — satisfactory progress has been made towards firmly establishing the new organisation; and it is indeed very gratifying to the officials of the N.Z.E.A. to note, in addition to the sound development, the hearty welcome extended to the Association upon its springing into life and the numerous good wishes expressed for its welfare and success, which already have been received from samideanoj in different parts of the Dominion.

The three patrons elected by the Conference — the Prime Minister, Sir Joseph Ward, together with Sir Robert Stout and Sir George Fowlds — have accepted office. This augurs well for the future activities of the N.Z.E.A., for the Association is bound to prosper and to have its status raised under the protection of these influential patrons. The Executive of the Association has been set up as arranged by the Dominion Conference, with the addition of Mr. A. Dewar, who has been appointed the delegate of the Masterton Group. It is a noteworthy fact that the Executive consists of active officials, whose metal has been proved, of the various N.Z. clubs and societies.

During March, circulars inviting membership to the N.Z.E.A. were printed and posted to all New Zealand Esperantists, with the result that at the time of writing (5th April) no fewer than 85 members have been enrolled. Much organising work has been accomplished by the honorary secretary (Mr. Wm. H. King, 119a Kelburn Parade, Wellington), who has also arranged for the exhibition of Esperanto magazines on the tables of the Parliamentary Library at Wellington. Several enquiries relative to Esperanto books and journals have already been received by the Association.

A good deal of important work yet remains to receive attention, included being such questions as the ways and means of introducing Esperanto into New Zealand schools; the inauguration of an Examination Committee; the arranging of a N.Z. congress; preparation of an Esperantists' directory; and the reviving of several clubs, etc., now lying dormant. The N.Z.E.A. is hopeful for the satisfactory arrangement of all these matters; and it is certain that with a strongly supporting and unapathetic membership much will be achieved for Esperanto in New Zealand. However, the work which will be undertaken is largely dependent on the measure of support accorded the Association in general and the Executive in particular; but at this early juncture, writing of a very encouraging nature is upon the wall.

PRI "MAJSTRO."

"Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam eksterduba, mi petas," diris Zamenhof ĉe Krakova kongreso, "ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi okupis dum dudek kvin jaroj, ke vi ĉesu honori min per tiu titolo. Tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esp-o, sed ke mi transdonis la tutan mastrecon pri Esp-o al la Esp-istoj mem Estas necese, ke la mondo sciigu, ke Esp-o povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan majstron. La Esperantismo kaj la Esp-istoj ne povas esti respondeaj pro miaj personaj ideoj kaj aspiroj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de iu el vi, ĉiu havas la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esp-a movado"

Komentariis Z. Adam, historiisto, pri tio: "Neniu certe povus nei la severan logikecon de tiuj ĉi vortoj de Zamenhof. Tamen ne estus facile por Esp-istoj plenumi lian deziron, ĉar ĉiuj estis kutimigitaj vidi en li ne nur la ĉefon de la Esp-a movado, sed ĉiam sentis por li ankaŭ profundan, koran simpatian por liaj noblaj ideoj, por la multjaraj oferoj, kiujn li alportis al tiuj ideoj, kaj ankaŭ ĝuste pro tiu modesteco, kiu karakterizis ĉiujn liajn agojn ĝis tiuj ĉi lastaj vortoj. Ne estas do mirinde, ke kiam H. Fischer lerte proponis, ke 'ĉar ni jam estas plenjaraj, ni do povas malobei patron kaj daŭrige nomi lin — patro,' la sentoj de ĉiuj ĉeestantoj esprimiĝis en longaj, laŭtaj aplaŭdoj."

Kio precize signifas "majstro"? Estas kelkaj sinonimoj havantaj sendon "havi aŭtoritaton pri io, (aŭ, super io)." Devas esti, ke aŭ tiu aro da vortoj havas ĉiujn sian apartan esprimrecon, aŭ ke unu aŭ pli estas nenecesa varianto. Ni komparu estro, mastro, ĉefo, sinjoro, magistro. La difino de Grosjean-Maupin estas jene: Maitre (qui commande, qui possede); mastro, sinjoro; (qui enseigne) instruisto; (qui est superieur en talent) majstro. Tiu de Kabe: 1. Metiisto diplomita, laboranta memstare. 2. Specialisto, perfekte konante sian fakon, ĝuanta altan ŝaton. Tiu de Boirac: Lertulo, ĉefartisto (F. maitre en

son art, maestro). Por traduki la Anglan "master" oni uzas en N.T. ĉe Mat. 8/19 majstro (didaskale); 9/11 instruisto (same); 10/25 dommastro (despotes); 23/8 instruanto (kathēgētes); 26/25 rabeno (rabbi); Marko 13/35 domomastro (kurios); Luko 8/24 estro (epistata); Efes. 6/9 sinjoro (kurios).

En la M.T. la Hebreaĵn vortojn en-Angligitajn sub "master" Zam. tradukis per ĉefo (Dan. 4/9); estro (1 Reĝoj 22/17); mastro (Jes. 24/2; sinjoro (1 Sam. 25/27) kaj mastro (Mal. 2/12).

Supozinde estas, ke kelkaj, eĉ multaj, Esp-istoj nomante nian amatan ĉefon per la titolo "majstro" konscie uzas la vorton por komprenigi pli ol "artlertuleca" nuanco, ĉar ili pliĝuste sentas pri la "patro" ion pli proksiman (plinajbaran) al "adoro," sed pro tio, ke la vorto "majstro" jam estas enkolumnigita en multaj vortaroj, ĉiam havanta la limhavan signifon supre donitan, direble estas, ke aldone de tiu "adoreca" plinuanco ne estas necesa aŭ rajthava. Kompreneble, la ideo de "super(eg)a lerteco en iu arto" enhavata en "majstreco" logike sekvigas ideon de dece volanta submetiĝo antaŭ tiu supereco, sed la submetiĝo povas esti nur intelekta kaj tute ne ligita al iu aldoniteco al la posedanto de tiu artlerteco.

El la skribito estas esperate, ke jam vidigiĝis neceso por pripensa uzo de tiuj sinonimoj.

—Robo.

ESPERANTO AT THE INTERNATIONAL FAIRS.

Following what is now the annual practice the bulky catalogue of the Fair of Frankfort-on-Main for the autumn of 1928 again contains a ware-list in 5 national languages and in Esperanto. The Frankfort Fair has now used Esperanto with great success for nearly ten years in its advertising and correspondence.

The Leipzig Fair has again published a folder in Esperanto, of which 12,000 copies have been distributed. The Esperantist section of the Office of this Fair organises each year special meetings of traders employing Esperanto for commercial objects.

The first sample fair in Rio de Janeiro, which was opened at the end of June, employed Esperanto for foreign advertising.

—I.E.S.

THE LANGUAGE PROBLEM.

The advent of modern developments in commerce, telephony, broadcasting, talking films and aviation has created a very real need. Without question, each of these is hampered by linguistic limitations.

Circumstances have arisen in which it becomes necessary for mankind to know other languages besides the national tongue.

One stands appalled at the thought of foreign languages having been translated into so-called English.

The pidgin English met by the traveller in other lands may be amusing, but it certainly degrades our mother tongue. Its tendency is to defile the language which makes English literature so dear to the nation.

Even the American manner of using our language is repugnant to the cultured British subject.

It is not difficult to realise what would be the result when foreign announcers and foreign film artists attempt to give translated items to English hearers.

The same result would occur when an attempt is made to translate English into other tongues.

Aviators concur as to the difficulty of lingual communication when landing in foreign countries.

International telephone communication is almost impossible. The story of the tower of Babel has become very truth in the present epoch.

Facts must be faced courageously. Men and women cannot devote years to the study of foreign languages, but a language has been evolved, and could be used by all nations as auxiliary to the mother tongue.

The nature of this language is such that it can be easily and quickly learned, and freely spoken by all.

A conference of linguists representing the forty odd different speaking peoples, with official credentials from the various Governments, should have no difficulty in solving this problem. The report of such a body could be given effect to immediately by all educational departments, and a worldwide knowledge of the auxiliary language should be realised in twelve months.

Mr. Vernon Bartlett, who was special correspondent for Reuters and The Times in France, Switzerland, Germany, Poland and Italy, and who now is London representative of the League of Nations, recently broad-

casted from London. Having special opportunities and knowledge, he was emphatic that the adoption of any one national language as the international language was quite impossible. He stated that force of circumstances is compelling us to adopt a form of international auxiliary language.

Many film artists and producers already favor Esperanto as a language which fills the need.

Mr. Clarence Brown, a well known producer, is reported as having said "the success of the talking film in America will spread to Europe and South America, and unless Esperanto is understood generally an international exchange of talking pictures will be impossible." Dr. Ludwig Berger, Hollywood, is of precisely the same opinion.

Miss Elga Brink, who is playing in English films with great success, was recently interviewed. Of the talking films she said they are yet in their infancy, but they have international importance, and if used in combination with Esperanto will open up possibilities hitherto undreamed of.

Mr. Fred. Niblo, the world famous film producer who produced "Ben Hur," says that the success or otherwise of talking films lies in a solution of the language problem. He is of opinion that the English language is not desired on the European continent. It is quite impracticable for artists to learn many national languages, many famous film stars do not possess ability in that direction. The question of accent and idiom is a standing barrier. He states further that the English language as spoken in England is not liked in America, neither do English people like Americanised English. Mr. Niblo is driven to the conclusion that a neutral international language only will solve the problem.

Recent events and developments have moved so rapidly that the whole question of lingual intercommunication between nations has come to be a matter of first-class importance.

This fact is recognised by the League of Nations, and through the International Labor Bureau a monthly Bulletin is issued relating to world labor affairs; this paper is printed entirely in Esperanto and has a worldwide circulation.

Many European Governments publish Tourist Guide Books which are wholly in Esperanto.

Twenty-two important broadcasting stations in Europe are giving programmes regularly in Esperanto.

Important speeches such as Sir Arthur Keith's Presidential Address on the Origin of Man are immediately translated into Esperanto and these find a ready sale in every corner of the known world.

These things show conclusively that the language problem may be solved by the adoption of a wholly neutral language capable of being easily learned by people of every nation.

Used orally Esperanto is euphonic, the vowels are softened and the accent is always on the penultimate syllable. There is no indefinite article, there are no exceptions. The whole grammar is contained in sixteen short paragraphs, hence the comparative ease with which Esperanto may be acquired and retained.

ESPERANTO AND EDUCATION.

The teaching of Esperanto has already been introduced in a considerable number of schools in various countries, either as an optional or a compulsory subject.

The Minister of Worship and Public Instruction of Poland has authorised the teaching of Esperanto as an optional subject in all schools in which a request has been made for the same. In Austria and Czechoslovakia the official examinations in Esperanto continue to be regularly held and attract increasing attention and interest in teaching circles.

In view of the 21st Universal Esperanto Congress, which will meet at Budapest in August, the Hungarian Ministry of Worship and Public Instruction has renewed the authorisation to teach Esperanto in all Catholic intermediate schools for 1928-29.

—I.E.S.

KRONIKO.

AUCKLAND, Nov-zelando. — La sekretariino de la loka Societo (S-ino E. M. Watkin, 5 Park Crescent, Parnell) de post Januaro restis ĉe Nelson, sed post ties reveno dum Aprilo la Societo refunkciados.

S-ino B. King daŭras aranĝi por la ofta apero en la tagĵurnaloj de pri-Esperantaj novaĵoj, per tio celante eduki la ĝeneralan publikon al "Esperantismo" sento. Ankaŭ S-ino King klopodas starigi klason en la urbeĝo.

MASTERTON, Nov-Zelando. — La grupo tie ĉi kreskis jam ĝis 16 geanoj, sed bedaŭre ni devas kroniki foriron de unu membro, s-ro pastro Kean, kiu en la pasinta monato translokiĝis al Picton, Suda Insulo. La grupanoj kiel signon de altestimo donacis al li ekz. de la Sankta Biblio.

Je la 25a Marto la grupo okazigis sian unuan ĉiujaran festvesperon, kiu estis bone ĉeestita kaj granda sukceso. Parlamentano s-ro G. Sykes prezidis. La vespero malfermiĝis per la Esperanto-doksologio kaj enhavis jenajn programerojn; kantoj, s-inoj Lambert kaj Dewar; deklamo, s-ino L. Payne; fortepianaj soloj, s-ino Carle kaj s-ro Knott; kantoj nacilingvaj (Kroate) kaj Esperanta, s-ro Pavlinovich. La plej juna membro, f-ino Evelyn Johns, donacis al s-ro Sykes verdan stelon.

CHRISTCHURCH, N.Z. — S-ro A. More, sekretario de la Christchurch Esp. Soc., (48 Hackthorne-rd., Cashmere Hills) raportas bonegan progreson faritan de sia societo. La membraro, nombre 25, diligente laboras. Krom per diversaj fakoj de studo, la anoj sin okupas per lernado de teatraĵo. Je la jarfino tio estos prezentita. La Societo aliĝis al la N.Z.E.A., kaj ricevis en la 12a de Marto viziton de du anoj el la Masterton grupo.

Tre notinda fakto kaj kuraĝiga signo estas vendoj de Esp. lernolibroj kaj vortaroj dum pasintaj semajnoj, kaj taksante per tio, oni povas diri, ke ŝajne spertigas nova periodo de akra revivigo de pri-Esperanta intereso.

WELLINGTON, N.Z. — Ĉiusemajn klubkunvenoj regule daŭras, ĉiu daŭranta du horojn—unua horo por lecionoj, dua por lekcioj, paroladoj, ktp. Multaj altgradaj kaj edukaj programeroj, faritaj tute en Esperanto, estis ĝuataj. Menciinde estas, ke ne nur la spertuloj, sed ankaŭ la progresintaj ĝelernantoj kontribuis al sukceso de la vesperoj per programeroj.

La klubo posedas bonan provizon de Esperanto-libroj, kaj kontentige

estas ke la bibliotekisto raportas pli-grandigon en la librovendoj.

Je la 22a de Marto, la klubprezidanto, S-ro E. C. Jack, paroladis de radiostacio 2YA dum kvaronhoro (7.40 ĝis 55 vespere) pri temo "Radio kaj Esperanto."

La ĉefsidejo de la N.Z. Esp. Asocio troviĝas niaurbe kaj ties sekretario (S-ro King) sciigas ke la Asocio estas establita kaj ke ĝi ricevas bonegan subtenadon de samideanoj. (Vidu apartan raporton pri N.Z.E.A.)

SYDNEY. — Dum la pasinta monato nova prezidanto estis elektita en la loko de d-ro Williams. Li estas s-ro E. Pryke, D.B.E.A., multjara kaj sperta Esperantisto, kiu estis ano de la unua Sidneja Esp-o Societo, en 1909. Anoj ĝuis tri interesajn paroladojn pri tri vaste malsimilaj temoj, kaj de tri lertaj Esperantistoj.

La temo de s-ro Simon eble estis tiu, kiu plej interesas Esperantistojn. Li pritraktis "parolantajn filmojn," klarigante ilian funkcion kaj ilian rilaton kun internacia lingvo. Kino-direktistoj, diris s-ro Simon, jam konfesas, ke internacia lingvo estas urĝa neceso por parolantaj filmoj. Oni trovas, ke neniu el la naciaj lingvoj taŭgas por tiu celo, pro la malbona maniero en kiu homoj parolas alinacian lingvon. Esperanto sole taŭgas por tiu celo, kaj kelkaj famaj geaktoroj ĝin favoras. Je la 11a de la monato s-ro Feldmayr rakontis sian viziton al Venicio, dirante, ke li povis per helpo de Esperanto, havi spertojn neveneblajn al ordinara turisto.

S-ro Rutland paroladis la 18an prenante kiel kutime neordinaran temon. Tiukaze ĝi estis La Tagoj de la Semajno, kiu, kvankam ne sonanta tre intereschava, povas fariĝi aŝkultinda temo, se oni ĝin pritraktas ĝuste. Nia s-ano prezentis la evoluon de la nuntempa semajno. Unua surprizo de la parolado estis ekscii, ke la semajno ne ĉiam, aŭ ĉie, konsistis el sep tagoj. En antaŭaj tempoj, kaj eĉ hodiaŭ, en iuj mondpartoj, kiel ekz. la Belga Kongo, la semajno konsistas el nur kvar tagoj. En

ĉi tiuj okazoj la longeco de la semajno dependas de la foirotago de la komunumo. En la Kongo la foirotago okazas unufoje an kvar tagoj, do la unua tago de la semajno estas "foirotago," la dua, "la dua tago post foirotago," ktp., dum tri tagoj, kaj post tio komencas nova semajno per nova "foirotago." En la tempo de Romo la semajno estis septaga, nomata honore al la planedoj, kiuj siavice prenis siajn nomojn de Romaj dioj. La Anglo-Saksaj loĝantoj de Anglujo havis kvintagan semajnon, kies tagoj nomiĝis per nomoj de nordaj dioj jene, Tiisdag, Udinsdag, Thorsdag, Frijdag kaj Savagsdag. Kiam la Romanoj venis Anglujon la Saksoj prenis la Roman septagan semajnon kaj por la du pluaj tagoj prenis la du unuajn tagnomojn de la Roma semajno, nome, Dies Sol, Dies Lunae, kiuj fariĝis en Anglo-Saksa lingvo "Sondag," "Moondag." Jen ni havas preskaŭ la nuntempajn nomojn de la Angla semajno. Kiam la kristanoj fariĝis multenombraj en Romo ili iom ŝanĝis la nomojn de la Romaj tagoj. La unua tago fariĝis Dies Dominica (tago de nia Sinjoro) kaj la lasta, Dies Saturn, fariĝis Sabato, la nomo de la Hebrea sankta tago. En Anglujo Savagsdag poste prenis la formon Saturday (tago de Saturn, kiel en la Roma semajno). Kaj nun en Anglujo, Germanujo kaj la ceteraj nordlandoj de Eŭropo la nomoj tagaj similas la nomojn de nordaj dioj, dum en latinaj landoj kaj ankaŭ en Esperanto la nomoj similas grandparte la nomojn de la kristan-Roma semajno.

KURSO PER TRADUKADO.

(Kondukata de G. Gordon, F.B.E.A.)

Sek.: F-ino B. Blyth, 10 Victoria av., Surrey Hills, Vic., E.10.

TRADUKO 12.

En la jaro mil-okcent-kvardeka Eyre ekiris je la plej fama el siaj esploroj, kun la celo eltrovi irejon, laŭ kiu oni povus (2) sendangere peli

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? rizorgas mendojn per poŝto. Memoru facila por via monujo. Li speciale p la adreson

Specialisto pri Fontanplumoj

Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

(3) bovarojn al la kolonietoj en Okcidenta Aŭstralio. Tiu eltrovo estus tre grava por la kolonianoj, ĉar pro ĝi oni evitus la grandan elspezon por transportado de bovoj per ŝipoj. Li ekiris de Adelaide la dekan (4) de Junio, kune kun kompanio de kvin aliaj blankuloj kaj du indiĝenoj. En la komenco li marŝis norden, esperante (5) trovi herboriĉan teron tra kiu vojaĝi la okcidentan marbordon (6), sed post multe da (7) monatoj da trura mizero kaj danĝero dum kiu li trovis la alnordan iradon barita (8) de salaj marĉoj kaj sekegaj dezertaj, li direktis la marŝadon sudokcidenten, kaj fine la ekspedicio sin trovis ĉe Fowler's Bay (golfeto de Fowler) en Great Bight (la granda enkurbo de la maro).

Oni tiam decidis (2) disigi la kompanion kaj sendi returne al Adelaide kvar el la blankuloj sur registara kutro (9), kiu renkontiĝis kun la ekspedicio ĉe Fowler's Bay. Eyre kaj lia subestro, John Baxter, ekiris por piediri al Albany en Okcidenta Aŭstralio. Akompanis (2) la kuraĝajn homojn la du indiĝenoj, vojaĝintaj kun ili de Adelaide, kaj kune kun tiuj estis indiĝena knabo nomata Wylie (elp.: ŭajli). Tiu ĉi lasta estis ano de tribo ĉe Albany kaj kuniĝis kun ili el la kutro. La vojaĝo de okcent kvindek Anglaj (10) mejloj (ĉirkaŭ mil tricent kvindek kilometroj) tra nekonata dezerto estis plena de senĉesa laboro, senigo de necesaj kaj maltrankvilego, kaj kiam ili faris (2) nur unu trionon de ĝi, la du indiĝenoj ŝtelis la pafilojn de la blankuloj, kaj pafe mortiginte (5) Baxter-on, ili forkuris kun tiom da manĝaĵo, kiom ili nur (16) povis porti forlasante (5) Eyre-on en la dezerto nur kun la fidela Wylie. Tagon post tago la du homoj daŭrigis la lacegigan marŝadon tra tiu dezerta regiono de sofo kaj malsato, ĝis fine ili alvenis la urbon Albany la sepan (4) de Julio mil-okcent-kvardek-unua.

Eyre loĝis en Aŭstralio ĝis la jaro mil-okcent-kvardek-kvina, kaj tiam (11) li reiris Anglujon (6) kaj tie publikigis la historion de siaj vojaĝoj sub la titolo "Eltrovoj en Meza Aŭstralio." La sekvantan jaron (12) li eniris la servon de la Brita registaro, kaj, en la daŭro de la postaj dudek jaroj li estis gubernatoro (13), laŭvice de Nov-Zelando, St. Vincent, Antigua, kaj Jamajko, sed en la jaro mil-okcent-sesdek-sesa la registaro revokis lin Anglujon (6) por respondi

al akuzoj kontraŭ li pri la metodoj, kiujn li uzis (14) en mil-okcent-sesdek-kvina por subpremi ribelon de Jamajkaj nigruuloj. Kvankam la komitato, kiu enketis pri la afero, trovis nenian kaŭzon por procesi kontraŭ li, tamen la registaro, konsiderante (5), ke resendi lin al Jamajko estus nesage, eksigis lin el la servo de la ŝtato, tamen donante al li planan pension. Li mortis la tridekan de Novembro mil-naŭcent-unua je la aĝo de okdek ses jaroj. — (Fino)

NOTARO 12.

Preseraro. — Trad. 11. En la lasta ĥnio krom du de par. 1, "milnaŭ-dek-dua" (mil-naŭcent-dek-dua). — 2. Rimarku la uzon de la aktiva formo de la verbo anstataŭ la pasiva, por eviti kunmetitan tempon. Notaro 1/21. — 3 "peli" aŭ "konduki." — 4. Pri la skribado de datoj. Cox pĝ 316 aŭ 329. — 5. Participa adverbo. Notaro 2/20. — 6. Rimarku akuzativon ĉe la loko al kiu oni iras. Oni povus uzi "al" kun nominativo. Cox 67(2). — 7. "multe da." Notaro 4/10. — 8. Predikata Participo, Notaro 1/7. — 9. "kutro," unumasta ŝipeto. (Verax, Rollet de l'Isle). — 10. Car estas diferenco (granda en iuj kazoj) inter la longo de mejlo en unu lando kaj tiu en alia, estas bone aŭ skribi longojn laŭ la internacia metra sistemo (almenaŭ kiam estas grve por precizigi) aŭ (ne tiel bone) skribi "Anglaj" antaŭ "mejloj." Kilometro estas ĉirkaŭ kvin okonoj de Angla mejlo. — 11. Pri "when" en la ĉi-tiea senco. Notaro 7/5. — 12 Akuzativo de punkto de tempo. Ankaŭ estus bone skribi "en la sekvanta jaro." Cox 68(3b). — 13. Sajnas al mi, ke "gubernatoro" aŭ "koloniestro" estas pli bona ol "guberniestro" por "governor" de Brita kolonio. Vidu F.K. 95/27. "Gubernio" (government) estas Rusa nomo por Rusa provinco. Oni rimarku, ke ĉe Agoj 23/24 en la plena Biblio oni anstataŭigis "guberniestro" per "provincestro." — 14. "Uzis" estas tute tiel klara, kiel "estis uzinta." Notaro 1/21. — 15. Mi dubas, ĉu la aŭtoro prave skribas "natives" (indiĝenoj). — 16. "nur" ĉi tie akcente esprimas, ke ili portis ĝis la limo de sia povo. Komp. "Ni tial decidis vivi tiel malkare, kiel nur eble, ŝpari kiom ni nur povis" (F.K. 114/9). Vidu ankaŭ F.K. 19/15, Mart. 117/32, 96/6.

HOMONIMOJ.

Akt, act (drama); deed (document).
 Artikol, article (gram.); article (in journal, etc.)

Atlas, satin; book of maps; Atlas (myth.)

Cert, one, some ("a certain man"); sure.

Daktil, date (fruit); dactyl (poetry).

Dam. king (at draughts); queen, (at chess or cards).

Domen, domino (game); hooded masquerade cloak.

Er, a particle; era.

Firm, firm (steadfast); firm (au firmao) business company.

Frank, franc; Frank.

Hiacint, hyacinth (fl.); jacinth (stone).

Kanon, canon (ecc. law); cannon.

Las, to permit; to leave.

Mark, German coin; sign.

Organ, part of body; party gazette.

Penik, paint brush; cluster (grapes, etc.)

Sekund, second (time); to second (duel).

Turb, top (toy); periwinkle.

Takt, (beat, mus.); discretion.

—El Brita Esperantisto.

CHANGE OF EDITORSHIP.

Owing to the early departure of Mr. Percy Hudson for India it has been arranged that the editorship of the "S.K." henceforth be in the hands of Mr. R. Banham, who confidently appeals for the continued support of the paper's subscribers and well-wishers.

TRADUKETO LAŬ HEINE.

(Page 334 Fundamenta Krestamatio.)

Here, on my heart, torn with anguish
 so grievously,

Rest the sweet hand of thine, girl to
 me dear.

Hear you not there how some Inner
 One's laboring.

Building for me, without ceasing, a
 bier?

Ah, in this heart of mine strikes no
 so bitterly;

Life itself flees from me; nothing re-
 mains.

Hasten, thou Inner One, finish thy
 laboring,

Let me sleep for aye, freed from my
 pains.

—Trans. Robo.

LETERO EL JAPANUJO.

Esperanto pli ol iu ajn fremda lingvo.

Oni ofte laŭdas ke iu flue parolas en lingvo angla, franca aŭ germana. Ĉu efektive tiel flue kiel angloj, francoj aŭ germanoj mem, aŭ en tia grado, kian oni rimarkas ĉe fremduloj, kiam ili parolas japane?

Ne grave, ĉu tiu aŭ tiu ĉi estas la fakto, sed vidante, ke bonaj parolantoj de tiu aŭ alia fremda lingvo estas, speciale kun orientuloj ĉe okcidentaj lingvoj, unu aŭ du el centoj da ĝiaj lernintoj, ni povas facile konvinki nin, ke multego da tempo kaj energio estas vane konsumitaj por lerni ĝin.

Kiom koncernas nur interkomprenigado kun fremduloj, ni do asertas, ke lernado de fremdaj lingvoj estas de la plej malgranda efikeco kaj la plej teda rimedo por la nuntempuloj, kiuj jam posedas la plej facilan interkomunikilon Esperanto elpensitan de la senekzempla monda geniulo D-ro Zamenhof.

Pripensu momente, kiu el niaj diplomatoj aŭ lingvistoj kuraĝus rompi la rekordon faritan lastatempe de S-roj Ossaka kaj kelkaj aliaj, niaj gloraj ambasadoregoj Esperantaj, kiuj interkomprenigadis perfekte kun la gastigantoj en Usono, Francujo, Anglujo, Germanujo, Danzigo, Polujo kaj ĉie, kien ili vizitis.

Ni celas liberigi la homaron, koncante de ni, japanoj, de la vanaj klopodoj turmentaj al gejunuloj koncerne lingvo-lernadon.

Forstreku la frazon: "flue paroli en lingvo angla aŭ alia," por ke ĝi ne allogu gejunulojn, ĉar ĝi estas efektive nenio krom malnovmodaĵo de la pasinta jarcento.

K. Takahaŝi,
 Ŝizuka.

ESPERANTO AT INTERNATIONAL CONGRESSES.

The number of international conferences and congresses employing Esperanto as one of their languages or as the sole language for translations is continually increasing.

On the invitation of the Office of the Frankfort-on-Main Fair an International Touring and Advertising Conference was held in Frankfort in Easter. A considerable number of persons and organisations interested in these matters from all parts of the world took part. Speeches and reports were allowed in all national languages, but Esperanto was the sole language for translations.

The next congress of the Federation of Educational Associations will be held in Geneva at the beginning of August, 1929, under the auspices of the International Office of Education. Esperanto will be the only language allowed for translations in certain sections.

—I.E.S.

ESPERANTO AND TOURING.

The Tourist Offices continue to publish prospectuses, etc., in Esperanto. Recently the towns of Budapest, Albertville (Haute Savoie), Norderney (Germany), Padua, Cologne (2nd edition), Zutphen (Netherlands) have published guides in Esperanto. The Tourist Centre "Ĉedok," in Prague has adopted the same method for making known to foreigners the region of the Tatra.

—I.E.S.

LA LIMOJ DE LA SCIENCO.

Mi kredas al la scienco: mi bazas sur ĝia kreskado mian esperon pri la estonteco de la mondo kaj pri la homara progreso. Sed mi ankaŭ scias, ke en la homo estas multo, kiun la scienco neniam povos kontentigi. Estas en la homo sento pri la belo; tion la scienco eble povos klarigi, sed ne povos anstataŭi. Ankaŭ estas niaj emocioj—la fontoj de amo, espero kaj karito; la scienco ne povas pli ol klarigi tiujn, mi dubas, ĉu ĝi povos plintensigi aŭ plibonigi ilin. La scienco aŭ sciado estas vere nur unu nepre-neceso de la vivo; sed ĝi estas tiel gravega, ke mi metas ĝin en kategorion tute apartan.

(Sir A. Keith, en la Daily Express, konkludante en artikolo "Kial mi kredas al la Scienco") Trad. Robo.

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY. 449a Pitt-st.

May 23—Psikologio de Rusa popolo. I. Serišev.

May 30—Social Evening.

June 6—Vojagimprecoj. H. Mathashin.

June 13—Early Esperanto Personalities. R. Swainson, O.B.E., D.B.E.A.

June 20—Filozofio de bolŝevismo. I. Serišev.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni danke kvitancaj ricevon de donacoj kaj abonoj jene:—C. M. Smith 4/6, Dec. '29; A.E.A., donaco, 32/-; F. J. Williams, 5/-, Dec. '29; P. Hudson, 9/-, Julio, '31; C. M. Pocklington, 9/-, Julio, '31; Melb. Biblioteko (Esp.-Soc.) 12/-; J. Skurrie, 4/6, Feb., '30; D. Hitchcock, 5/-, Junio, '30; D. B. Thomson, 4/6, Feb., '30; J. A. McDonald 4/6, Majo, '30; C. Caine, 12/-, Feb., '32; P. Dean, 10/-, Sept., '30; W. King, 5/-, Aŭg., '30; Amiko, £1/1/-; L. Hiob, 4/6, Aprilo, '30; H. Torr, 4/6, Jan., '30. La dato informas pri la monato ĝis kiu la sumoj estas pagitaj.

ANONCO.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretario, S-ro L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; d-ro F. J. Williams; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 174 Burwood Road, Burwood.

Brisbane Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Viceprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Cayrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinlando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Mr. V. L. M. Daniel; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. U. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A.